

BELGA ESPERANTISTO

47a Jaro — N-ro 6a — Junio 1955a

Fondita
en 1908a

Redaktoro-Administranto:
la Prezidanto de R.B.L.E.:

Maur. JAUMOTTE

Avenuo De Bruyn, 44

Wilrijk-Antverpeno

Oficiala monata Organo de

REGA BELGA LIGO ESPERANTISTA

Asocio sen profita celo,

aliganta al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO



Abonprezo:
Fr. 100,-

NIA TRIA BENELUKSA KONGRESO EN UTRECHT

Sabalon posttagmeze

La vetero ne promesis multon bonan, kiam la Kongresanoj, sabatmatene, ellitiĝis kaj pretiĝis sin por la vojaĝo al Utrecht, kie okazus la tria granda renkontiĝo de tri Ligoj...de tri jubileantaj Ligoj.

Se ni iom apartigas la kongreson de pasinta jaro, al kiu partoprenis nur tre malmultaj membroj de L.E.E.N., pro la fakto ke la Universala Kongreso estis antaŭvidata en Nederlando, kaj se ni komparas do la trian komunan kongreson kun la unua en Antverpeno, ni povas, — jam ekde la komenco, — konstati kaj substreki, ke se la Antverpena restas senegala laŭ la temperaturo, kiu regis...la spirito tamen dum la tria estis certe egale

bona, amika kaj kora - kaj la aranĝoj tre certe same multe plaĉaj.

Kiam la kongresanoj, posttagmeze, alvenis en Utrecht, ili estis, jam ĉe la stacidomo, bonvenigataj de bonvolemaj helpantoj de la L.K.K., dum la flirtantaj flagetoj ĉe ĉiuj aŭtobusoj estis kiel tiom da bonvenigaj ridetoj, kiuj tre larĝe kompensis la daŭrantan grizecon de la ĉielo.

La pluvo tamen jam ĉesis, kiam komenciĝis la unuaj programeroj.

Akcepto organizita de LEEN

Okaze de sia jubileo, la Nederlanda Asocio L.E.E.N. invitis al akcepto en la belegaj salonoj de la moderna kaj luksa hotelo *Smits*, ne nur sian membraron, sed ankaŭ la aliajn kongresa-

nojn kaj diversajn simpatiantojn.

Temis pri intima, sed tre agrabla akcepto, dum kiu, — ĉe granda tablo, je unu flanko de la salono, — sidis la tuta estraro de L.E.E.N., kun, en la mezo, S-ro Blokker, la prezidanto.

Ĉiu havis la okazon persone gratuli la ĉefestraron.

Trinkante glason aŭ tason kaj fumante cigaredon aŭ cigaron, oni jam povis konatiĝi aŭ rekonatiĝi kun kiuj oni pasigos tri agrablajn tagojn.

Je la fino de la akcepto, S-ro Maurice Jaumotte, prezidanto de Rega Belga Ligo Esperantista, deziris jam tuj gratuli la fratan asocion kaj la estraron de L.E.E.N., okaze de ĝia ora jubileo.

Kiel daŭra memorigilo al tiu ĉi festa tago, li anoncis ke la estraro de R.B.L.E., decidis donaci al L.E.E.N., la oran medalon, kiun la belga asocio kreis okaze de sia jubileo, same ora, kaj kiun ĝi solene festis en Antverpeno, jam dum la monato de februaro.

Li pinglis la medalon sur la bruston de S-ro Blokker, prezidanto de LEEN, kaj tiam sin turnis al alia flanko, kie staris la estraro de Flandra Ligo Esperantista kaj, post same amikaj paroloj, li pinglis la arĝentan medalon sur la bruston de S-ro G. Debrouwere, prezidanto de tiu ĉi Ligo.

Same kiel S-ro Blokker, S-ro Debrouwere dankis pro tiu ĉi afabla gesto kaj aldonis siajn gratulojn, okaze de la jubileo de LEEN.

Oficiala akcepto en la Urbdomo

Intertempe la vetero pliheliĝis. Kaj tra strato plenplena de promenantoj, la Kongresanaro iris al la Urbdomo.

En la vasta halo, kiu estas uzata kiel akceptsalono kaj kiu estis lumigata per dekoj da blankaj kandeloj, ĉiuj grupiĝis por atendi la eniron de la Urbestro, kiu cetere tre baldaŭ envenis.

La urbestro, Jonkheer C. J. A. de Ranitz tuj bonvenigis la kongresanojn en sia urbo Utrecht, kiu estas la naskiĝloko de la nacia asocio L.E.E.N.; li



La akcepto en la Urbdomo, kie oni rekonas de dekstre maldekstren: la urbestron, s-rojn Blokker kaj Zondervan, resp. Prezidanto kaj estrarano de LEEN.

memorigis pri la grandaj eventoj en la vivo de tiu asocio kaj kiuj fakte korespondas kun la grandaj paŝoj antaŭen de la esperanto-movado.

Li gratulis L.E.E.N. kaj ankaŭ la du aliajn jubileantajn ligojn, al kiuj li deziris plej belan prosperadon promesante kiel eble plej larĝan apogon kaj invitis ĉiujn ĉeestantojn trinki vinon kaj frandi bongustajn kuketojn.

Dankinte la Urbestron pro liaj kuraĝigaj paroloj S-ro Blokker, siavice, aldonis kelkajn detalojn pri la lastaj paŝoj kaj venkoj de nia movado; fine la Urbestro prezentigis al si la prezidantojn de la Ligoj kaj de la L.K.K. kaj kelkajn eminentulojn de la movado.



Sceno el la teatraĵo „Kio plej allogas“.

Antaŭ ol foriri, S-ro Jaumotte, — en Esperanto kaj laŭvoĉe, — resumis la interparolon, kiun tiuj ĉi lastaj havis kun la urbestro.

La urbestro, kiu tre atente aŭskultis, ne kaŝis sian miron pri la „flueco“ laŭ kiu Esperanto povas esti parolata.

La sabata vesperfesto kaj balo

Antaŭ la komenco de la sabata vesperfesto, kiu okazis en bela teatra salono de la „Gebouw voor Kunsten en Wetenschappen“, kaj por anstataŭi efektivan malferman kunsidon de la Kongreso, S-ro Blokker supreniris la scenejon kaj diris koran bonvenon al ĉiuj; li citis la salutleterojn kaj senkulpigajn mesaĝojn kaj oficiale deziris al ĉiuj plej belajn festotagojn.

Li vokis sur la scenejon siajn kolegojn, prezidantojn de Belga kaj Flandra Ligoj Esperantistaj.

S-ro Maur. Jaumotte, en fajra paroladeto, substrekis la veran signifon de jubileo, kiu estas ne nur festinda okazaĵo, sed kiu estas ankaŭ okazo

por memorigi la sumon, la amason da laboro farita de sennombra anaro, en tiuj kvindek jaroj da ekzisto, kiujn oni nun festas.

La energio metita de dekoj, de centoj, de miloj da samideanoj, je la dispono de nia movado dum tiu duonjarcento reprezentas gravegan potencon kiu estas la plej vera garantio por la estonto.

Kaj li salutis la generacion jam levigintan kaj kiu daŭrigos, dum la venontaj jaroj, la laboron jam preparitan kaj faritan de la pioniroj.

Post la paŭzo, ankaŭ S-ro Debrouwere alportis la saluton de Flandra Ligo, kiu ekzistas nur 25 jarojn, sed kiu solidariĝis, en la hodiaŭa tago,

NIA TRIA BENELUKSA

(senpretendaj konsideroj)

Ciu kongreso nia estas sukces'... ferla sed pia: la interkomprenemo, internidea premo de multaj samlingvanoj, aŭ samnaciaj anoj per lingv'... internacia por stud' Akademia.

Isbrücker (1) mem ĉeestis Gysbreghton li digestis: simbol' de cerbmasaĝo kaj de l'matura aĝo de la kongresanaro. Nu, Frieso Moolenaar'o (2) junulojn per kantato kantigis laŭ Privat'o kaj Zamenhof, sed ve, varbigis ili ne...

Tri ligoj kunvenadis kaj lavitajon gladis, portotan tra la jaro en jubile-fanfaro (3) dum babilado daŭris... kaj Leen preskaŭ bedaŭris ke...

Holando akurata estu fotografata.

Jen Jung, ĉiam... malolda sur sia kamp' Herolda paperpailo ĉasas la aĵojn kiuj okazas: ni ĝoje ilin legos, ... esperon plu flegos en lumo de l'profeto de l'Triumfont-gazeto (4)

Al Perk, kolegoj, danko ŝuldata estas, ankaŭ al Koudijs... senglacia gvidanto surpodia, pro la gastama rekto, kiel al ni Utrekto ĝin montris en urbdomo per... malsekiga dono. Cetere l' senkompata vetero de la Biltto(5) estis anstataŭata per... senpluvera mildo.

Konvenas nun konkludo kaj estu ĝi vortludo: nomigos l' ambicia, la Beneluksa tria, pro ĝia artmana' Rubeneluksa ja!(6)

Tyneverum.

1) Prez. de la Akademio; traduk. de „Gysbreght van Aemstel“, tragedio de Joost van den Vondel (1587—1679) prezentita dum la kongreso - 2) komponisto de la kantato „El la vivo de Zamenhof“ - 3) L.E.E.N., belga kaj flandra ligoj jubileas - 4) „Heroldo de Esperanto“ nomigis de 1920 ĝis 1925 „Esperanto Triumfonta“ - 5) la nederlanda meteorologia observatorio - 6) cetere la juvela ŝtono kiu simbolas la amon.

tago en hotelo dum libertempo.

Same kiel la kantistino tiuj ĉi kun-

laborintoj al la programo estis varme aplaŭdataj.

Kaj por fini la vesperon ĉiuj supreniris al la unua etaĝo, kie, en alia tre alloga salono, vigla orkestro dancigis ĉiujn, laŭ arango de S-ro G.

LA DIMANĈA TAGO

Diservoj

Je la 8,30 multaj kongresanoj partoprenis dimanĉmatene unu el la du Diservoj organizitaj:

Por la Protestantoj en la Leeuwenbergpreĝejo, Servaasbolwerk, kie S-ro W. Koopmans, ĵus resaniĝinta, gvidis la servon en kunlaboro kun S-ino Jelly Koopmans-Schotanus kaj Thom de Korte, knaba soprano.

Por la Katolikoj en la beleta Kapelo de la Ĉiama Adoro, Westerstraat, kie dum la Sankta Meso, kun kantoj de la monaĥinoj, predikis tre trafe Lia monaĥa Moŝto Hubertino O.F.M.Cap.

La Ligaj kunvenoj

Kaj je la 10a ĉiuj retrovigis en la salonoj de la Hotelo Smits, kie apartaj ejoj estis rezervataj al la tri Ligoj.

Antaŭ la komencigo de tiuj ĉi kunsidoj, delegacio de Flandra Ligo Esperantista, kunmetita el S-roj G. Debrouwere, G. Maertens kaj Th. Van Gindertaelen, vizitis la salomon, kie estis kunvenonta Reĝa Belga Ligo Esperantista.

S-ro Debrouwere transdonis al la prezidanto S-ro Jaumotte belajn florojn, kiel respondo al la gesto de la antaŭa tago, kiam R.B.L.E. donacis la arĝentan Medalon al Flandra Ligo.

Se tiu ĉi jam ne posedas Medalon, ĝi tamen kun same simpatiaj pensoj transdonis tiun bukedon da floroj, por kiu S-ro Jaumotte tre afabla dankis.

Promenado tra la urbo

Por la membroj de Reĝa Belga Ligo Esperantista, — kies kunsido ne estas laborkunsido sed nur solenaĵo, — kaj por tiuj membroj de la aliaj Ligoj, kiuj jam estis liberaj, la L.K.K. organizis je la 11,30a gvidatan promenadon tra la Urbo.

Tiu ĉi iom detala vizito, kiu daŭris proksimume du horojn, estis gvidata de la simpatia sekretario de la L.K.K., F-ino Perk kaj de S-ro Vaneček, kiu ĉi lasta tamen precipe estis dononta la klarigojn dum la lunda ekskurso, dum F-ino Perk tre interese klarigis, survoje, la historion de Utrecht, kiel ĝi estas videbla tra kaj en ĝiaj ofte malnovaj kaj ĝenerale tre belaj monumentoj.

Oficiala fotografado

Je la 13,30, la ampleksa grupo, kiu fidele sekvis la gvidantinon, alvenis al la Tria Ĉefadministratorejo de la Nederlandaj Fervojoj, kie iom poste an-

Maertens, kiu akceptis zorgi pri surprizoj kaj specialaj dancnumeroj.

Ĝis la lasta horo, jam matena, gaja atmosfero regis inter la dancema kongresanaro.

Libera posttagmezo

Anoncita vizito al la Muzeo ne povis okazi, ĉar oni ne povis akiri ĝian malfermigon je la horo, neordinara, kiam ni estus povintaj ĝin viziti kaj tiel ĉiuj disponis pri duona libera posttagmezo, kiun, ĉe la bela vetero, multaj ĝuis, ĉu promenadante ankorau iomete, ĉu trinkante glason en agrabla ejo.

La arta vespero

La arta vespero, kiu estis organizata okaze de tiu ĉi Kongreso, estas okazaĵo pri kiu oni ankoraŭ longtempe parolos en la nederlandaj esperantaj medioj.

Ĝi komenciĝis tre akurate je la oka en la teatra salono de la „Gebouw voor Kunsten en Wetenschappen“ kaj konsistis el du partoj.

Dum la unua, la scenejo estis preskaŭ tro malgranda por enteni la du gravajn horojn, unu de plenkreskuloj kaj alian de junuloj, speciale gvidatan de Aleid Feith-Goetsch, dum la konata ĥorestro Mees van Huis gvidis la tutan kantaton, kiun li mem instruis.

Temis pri granda kantato, verkita laŭ tekstoj de Prof. D-ro Edm. Privat kaj D-ro L. L. Zamenhof, de nia samideano Frieso Moolenaar, membro de la Grupo de Groningen, kies delegito cetere, post la longaj aplaŭdoj, kiuj sekvis la aŭdigon, alportis al la komponisto plej koran saluton kaj belan donacon.

Al la sukcesigo de tiu ĉi muzika parto ankoraŭ kunlaboris Laurens Indermauer, baritono, kiu kantis la solopartojn de la kantato; Stoffel Van Vliegen, organisto de la utrehta „Dom“, kaj Marinus van Steenwijk, pianisto.

Ĉiuj meritas verajn laŭdojn por sia laboro, same cetere kiel ĉiuj artistoj, kiuj kunhelpis al la realigo de la dua teatra parto.

Temis nun pri la prezentado de plej gravaj eliraĵoj el „Gysbrecht van Aemstel“, la fama verko el la klasika literaturo, de Joost van den Vondel, en la tre bela traduko aŭ adaptigo kaj reverkado, — diris S-ro Koudijs, — de Ir. J. C. G. Isbrucker, prezidanto de la Akademio de Esperanto, kiu kun S-ino Isbrucker ĉeestis la vesperon.

Ni ne povas citi aparte la meritojn de la diversaj artistoj, sed konsideras ke, en tiu ĉi raporto, devas tamen esti menciataj la nomoj de S-ro J. S. J. Jansen, kiu ludis la Cefrolon, kaj de ĉiuj, kiuj ĉirkaŭis lin kaj kiujn ni citas laŭ la ordo de la programo: S-ino L. Nipperus-Adriaans (Badeloch, lia edzino), G. W. J. Duivis; F. M. Beemsterboer; J. S. Jansen; A. F. Leideritz; Willy Jansen; Marthi Jansen; P. de Waal kaj H. J. Brouwer. Dum pliaj ludis la rolojn de soldatoj kaj klarisoj, diversaj el la cititoj ludis plurajn rolojn.

kaj alvenis tiuj, kiuj ĝis la lasta momento estis diskutintaj gravajn propagandajn problemojn.

Kaj okazis ĝenerala fotografado kaj estis bona ideo jam vendigi tiujn ĉi fotojn jam posttagmeze, dum la festmanĝo.

Festenmanĝo

Dum tiu fotografado la kelneraro de Hotelo Smits ĵus nur havis la tempon por aranĝi la salonojn, kie la Ligoj kunsidis.

Sed sen grava malfruigo tamen komenciĝis la festa manĝo, ĉeestata de preskaŭ la tuta kongresanaro, kiu sidigis laŭplaĉe al la longaj tabloj metitaj en la diversaj salonoj kunigitaj kaj al kiu estis antaŭmetata la sekvanta menuo:

Supo

Rostita bovidaĵo

Diversaj legomoj

Bakitaj terpomoj

Sipolata pudingo

Fakte ne estis toasta horo, sed S-ro Telling, ĉefdelegito de U.E.A. en Nederlando, tamen volis speciale atentigi pri la ĉeesto dum tiu ĉi Kongreso de S-ro Rappley, la ĝenerala sekretario de U.E.A., kiu speciale vojaĝis el Anglujo ĉi-okaze.

S-ro Telling ankaŭ memorigis pri antaŭaj kongresoj, kiujn li ĉeestis en Belgujo, kaj dum kiu oni toaste paroligis lin... kaj li preskaŭ deĵorige alvokis reprezentanton de la samideanaro el Belgujo respondi al lia toasto.

S-ro Maur. Jaumotte kaptis la okazon por, jam nun, diri sian kaj ĉies grandan kontentecon pri la forfluginta unua duono de la Kongreso.

Li varme aplaŭdigis la nomojn de S-ro Koudijs, la vigla prezidanto de la L.K.K., kiu kvankam ne jam citita, tamen daŭre estis sur la podiumo, ĉe la estrara tablo, por ĝustatempe fari la anoncojn kaj alvokojn kaj por doni la necesajn informojn, tiel ke ĉiu kongresano ĉiam ekzakte sciis kio estis okazonta; de F-ino Perk, la ĉarma sekretario, kiu fidele helpis la prezidanton, kaj de ĉiuj cetere, kiuj antaŭ kaj dum la Kongreso dediĉis sian tempon al la organizo de nia granda jarfesto.

La estraro de la Nederlanda Esperanto Asocio L.E.E.N. tutkore dankas ĉiujn, kiuj neforgeseble kontribuis al la impona festo okaze de la 50 jara jubileo de la asocio. Pro la granda amaso da gratuloj estas neeble danki ĉiujn individue kaj tial ĝi elektis ĉi tiun formon.

Ĉiuj certe ankoraŭ longtempe memoros tiun ĉi prezentadon de la plej populara verko de Vondel, kiun li, en 1638, verkis por la inaŭguro de la nova Amsterdama Teatro, en kiu ĝi ankoraŭ ĉiujare estas ludata komence de januaro. Kiel oni scias, ĝi memorigas epizodon el la historio de la nederlanda ĉefurbo.

En la kongreslibro tiu ĉi teatraĵo estis tre detale priparolata, kaj tio tre certe ankoraŭ plifaciligis la komprenon de ĉiuj vortoj el la esperantaj versoj, cetere bone elparolataj de la diversaj aktoroj.

S-ro Isbrucker, je la fino kaj sur la scenejo, gratulis ĉiujn kiuj donis vivon al tio kio, — laŭ li, — estas nur la



La ĉefestraro de la 50-jara „La Estonto estas Nia”.

ostaro ... sed kiu vere estas, — ankoraŭ por la legado, — tre kompleta kaj plej atendinda verko.

LA LUNDA TAGO

La aŭtobusekskurso

Je la 9a, foriris de la Stationplein, aŭtoĉaroj, en kiuj granda parto de la kongresanaro estis kunigata, dum kelkaj ankoraŭ sekvis aŭtomobile.

La antaŭvidita ekskurso celis la naciĝan parkon „De Hoge Veluwe” kaj dank' al plej bela kaj varma vetero, ĝi iĝis grandega sukceso.

Ĉar la vizitata regiono estas unu el la plej belaj en Nederlando ĝi por multaj estis vera revelacio.

Kiam, je la 11a, oni estis ĝuinta kafen kun kuko en la grava restoracio „De Koperen Kop”, okazis gvidata vizito al la parko, dum kiu gardisto donis klarigojn, tradukitajn de S-ro Vaneček.

Kaj je la 13a ĉiuj denove kunsidiĝis ĉe longaj tabloj por la varma aŭ la malvarma lunĉo, laŭplaĉe. Pro la bela vetero, kiu venigis al la restoracio ankoraŭ multegajn aliajn turistojn tiu ĉi manĝo daŭris iom pli longe ol antaŭvidite, sed estis tamen sen grava malfruigo ke la aŭtoĉaroj reekveturis por detala rondiro tra la parko kaj reiro al Utrecht, kie ĉiuj alvenis ĝustatempe, krom unu aŭtoĉaro kiu survoje haltis por helpi malfeliĉan aŭtomobiliston, partoprenanton al la ekskurso.

La Oficiala fermo de la Kongreso

Kiam ankoraŭ tiuj ĉi lastaj alvenis en la salonoj Smits, okazis la oficiala fermo de la Kongreso.

Unue, S-ro Blokker diris sian gran-

dan kontentecon pri la evoluo de la Kongreso, pri la bonaj rilatoj inter la membroj de la tri ligoj kaj sian dankon al la L.K.K., kiu tiel bone ĉion organizis.

S-ro Jaumotte, nome de S-ro De-brouwere, kiu jam devis foriri kaj en sia propra nomo kaj en tiu de la membraro de ĉiuj venintoj de trans la landlimo, ankoraŭ kore gratulis la L.K.K.-anojn, kiuj tiel zorge ĉion planis... kaj ankoraŭ efektivigis siajn planojn.

Li konfirmis ke la atmosfero, kiu regis dum tiu ĉi kongreso povas nur instigi la gvidantojn de la tri ligoj daŭrigi la serion de la komunaj kongresoj kaj invitis ĉiujn vojaĝi al la urbo de nia kvara komuna kongreso.

Gento estas bela, granda urbo, en kiu la pasinteco kaj la nuno estas same trafe reprezentataj kaj indas viziti.

LA 3-a BENELUKSA: NIA 39-a (*)

La solena kunsido de R.B.L.E.

Post la foriro de la delegacio de Flandra Ligo, kiu alportis florojn kaj gratulojn, S-ro Jaumotte malfermis la solenan kunsidon de la Kongreso.

Li resalutis ĉiujn kaj gratulis la ĉeestantaron por la multnombra aliĝo de la membroj de la Ligo.

Li transdonis la parolvicon al S-ro H. Sielens, ĝenerala sekretario, kiu legis la raporton de la administrantaro, tiel kiel ĝi estis akceptata de la ĝenerala jarkunveno.

Li promesis ke, kun unuigitaj fortoj, Flandra kaj Belga Ligoj ĉion faros por ke tiu Kongreso ankoraŭ iĝu bela ĉenero en la ĉiam plilongiganta ĉeno de niaj beneluksaj Kongresoj.

Li anoncis ke nun jam 50 membroj sin enskribigis por tiu Kongreso 1956-a.

Kun lasta aplaŭdigo de la L.K.K. li konkludis sian entuziasmigan paroladon, al kiu S-ro Koudijs respondis, reportante sur siajn rektajn kunlaborantojn ĉies parton en la gratuloj ricevita kaj al kiuj S-ro Blokker estis aldoninta grandan parton de la floroj, kiujn L.E.E.N. mem estis ricevinta, okaze de sia ora jubileo.

Kaj tiam ĉiuj ekstaris kaj aŭdigis „La Espero”, kantata solene de ĉiuj, kiuj dum tri tagoj estis rebanintaj sin en tiu speciala kaj tiel alloga atmosfero de Esperanto-Kongreso.

Kaj baldaŭ venis, por la plimulto, la forira kaj revetura horo.

Feliĉaj, sed kun bedaŭro pro la rapideco per kiu ĉio forflugis, ĉiuj — ofte grupe, — reveturis al siaj respektivaj hejmoj... Kaj ĉie la adiaŭa vorto estis: Ĝis proksima jaro”.

L.R.

En tiu ĉi raporto, verkita de S-ro Soyeur, — kiu malfeliĉe ne povas ĉeesti la Kongreson kaj kiun la prezidanto senkulpigis kune kun D-ro Kempe-neers, la emerita prezidanto, — estas memorigataj la diversaj temoj, pri kiuj atentis la estraro dum la pasinta jaro.

La prezidanto aprobis ree tiun

(*) Sur la sekvanta paĝo ni presigas la liston de ĉiuj iamaj belgaj kongresoj.

ĉi raporton kaj komentariis ĝin. Li memorigis pri la ŝanĝoj en la estraro en kiu nun kunsidas S-ro J. Plyson, kiel vicprezidantino, kaj en kiu S-ro J. Soyeur reprenis de S-ro Sielens la taskon de kasisto.

Li ankoraŭ salutis la novan estraron de la brusela Grupo, kies prezidanto S-ro R. Jacobs ĉeestas la kongreson.

Li anoncis ke la „Premio Jennen” duafoje estis gajnata de la Verviersa Grupo kaj transdonis diplometon kaj sumon al S-ro Koeune.

Poste, li anoncis la intencon de la Ligestraro proponi al la du aliaj Ligoj, Genton, kiel Kongresurbon 1956 pri kio la estraro de Flandra Ligo jam konsentas. La ĉeestantaro aprobas tiun proponon kaj jam tuj kvindek da membroj aliĝis al la Honora Kolono 1956.

Fine, la prezidanto faris varman alvokon favore de Panjo la Kaso kaj kolekto farita alportas al la Ligo pli ol mil frankojn.

Kaj ĝustatempe por la promenado tra la urbo Utrecht, la prezidanto fermis la solenan kunsidon per lasta dankvorto al ĉiuj kaj per alvoko al plua laboro.

Niaj Belgaj Kongresoj

Longa estas jam la listo de la Kongresoj organizitaj de nia Ligo ekde la jaro 1909.

Ĉar, pro la organizo de niaj komunaj Beneluksaj Kongresoj, la vico de la kongresoj en tiu ĉi listo iom facile estas malatentata, ni donas ĉi sube la kompletan liston:

la 1a:	1909:	Verviers
la 2a:	1910:	Brugo
la 3a:	1911:	Charleroi
la 4a:	1912:	Gento
la 5a:	1913:	Spa
la 6a:	1914:	Mehleno
la 7a:	1915:	Bath (*)
la 8a:	1916:	York (*)
la 9a:	1920:	St. Gilles
la 10a:	1921:	Lieĝo
la 11a:	1922:	Sta Nikolao
la 12a:	1923:	Namuro
la 13a:	1924:	Brugo
la 14a:	1925:	Spa
la 15a:	1926:	De Panne
la 16a:	1927:	Mons
la 17a:	1928:	Antverpeno (*)
la 18a:	1929:	Gento

FONDAJO ANTOINETTE JENNEN

DEFINITIVAJ CIFEROJ 1954

Grupo de:	Jaro 1953		Jaro 1954		Procento
	Membroj	Poentoj	Membroj	Poentoj	
Antverpeno	151	609	160	646	106 o/o
Brugo	65	252	68	272	108 o/o
Bruselo	91	469	110	461	98 o/o
Charleroi	7	38	9	45	118 o/o
Gento	20	107	19	103	96 o/o
Verviers	13	63	35	161	255 o/o

La grupo de VERVIERS denove do akiris la premion.

BIBLIOGRAFIO

H. A. de Hoog. DU MALSANOJ EN ESPERANTO. Kia-ismo. Tiom-kiom-ismo. Eldonis Erik Carlen, Hällabrot-tet, Svedujo. 1954. 140 p. 18 x 12.

„Ekzistas malsanoj, pri kiuj oni antaŭe neniam aŭdis, sed kiuj kvazaŭ subite komencas disvastiĝi en ĉiam pli vastaj rondoj. Ankaŭ en lingvoj ekzistas tiaj infektaj malsanoj, eĉ en Esperanto, kaj mi volas atentigi ĉi tie pri unu, kiun mi observis jam de kel-

kaj jaroj. Mi volas nomi ĝin la „tiom-kiom- malsano”. Kiam ni serĉas en la Universala Vortaro la vortojn „kiom” kaj „tiom”, ni facile konstatas per la donitaj tradukoj, ke ili esprimas kvanton aŭ nombron, sed ne gradon. Se oni volas esprimi la gradon de la kvalito, nomata de iu adjektivo, oni devas fari tion, metante la vortojn „kiel” kaj „tiel” antaŭ la koncernan adjektivon.

Ekzemple oni diras en bona Esperanto: „hodiaŭ ne estas tiel varme, kiel hieraŭ; lia embaraso estis tiel granda, ke li tute ne vidis min”. Oni facile povas kontroli tion per la ekzemploj en la Ekzercaro de la Fundamento, aŭ konsultante bonan vortaron, kia estas la Plena Vortaro. ... Vere oni jam povas paroli pri malsano en la lingvo kaj estas bone, ke ni apliku kontraŭ ĝi la necesajn medikamentojn...”

Per tiu alarmkrio („Esperanto Internacia”, 1938; p.99-101) s-ro Isbrucker jam antaŭ jaroj instigis al zorga gardemo, al baldaŭa resanigo de la infektitoj.

Ankaŭ al nia lingvo-teritorio la minaco de la tiom-kiom-ismo tute ne estis fantazia, kiam fidinda kaj nemalprave multuzata gramatiko kiel *Tra la Labirinto* de Faulhaber ĝin malkaŝe favoras, profetante ke pro sia logikeco la uzado de TIOM-KIOM iom post iom elpuŝos la antikvigintajn TIEL-KIEL, kiam la grado estu indikata. Ekzemple: „ni ne estas tiom naivaj, kiom kredas kelkaj homoj”.

Kiel ajn aŭtoritata estas la voĉo de la Prezidanto de la Akademio kiam ĝi avertas kontraŭ la kontraŭfundamenta ŝanĝo de la signifo de la korelativoj, tiu sola, preterpasa admono apenaŭ sufiĉas por elimini nedezirindan influon de fontoj el kiuj daŭre kaj ĉiam denove pli junaj generacioj de esperantistoj ŝate kaj plendife ĉerpas sian lingvoscion.

Kaj jen la tasko kiun al si proponas la aŭtoro de DU MALSANOJ. Prilumante la problemon el diversaj anguloj, li klopodas por determini la laŭfundamentan uzadon de TIOM-KIOM, forigi la necertecon kiu regas sur tiu kampo, malaperigi konflikton kiu minacas la unuecon de Esperanto. Ne nur al la TIOM-KIOM-problemo li direktas sian atenton, sed ankoraŭ al la demando „KIA aŭ KIEL?”, kies revolucia efiko estas apenaŭ malpli grava.

En sia strikte metoda procedo la aŭtoro kolektas ampleksan provizon da ekzemploj el Zamenhofaj tekstoj, provas malkovri la lingvistikajn influojn kiuj kaŭzis la preferon de la Majstro por la elektitaj formoj, trovas ke kie oni akuzas Zamenhof pri nelogikeco, li plej ofte kvazaŭ instinkte sekvas la pli praktikan ekzemplon de

(*) Kelkaj notoj pri iuj Kongresoj: La 7a kaj la 8a, dum la unua mondmilito, estis organizataj de belgaj samideanoj, kune kun la britoj.

La 17a, en 1928 en Antverpeno, okazis en la kadro de la XXa Universala Kongreso.

La 23a, en 1934, estis antaŭvidata en Spa: sed pro la morto de la Liga Prezidanto S-ro Frans Schoofs, ĝi estis anstataŭata de ĝenerala kunveno en Antverpeno.

La 29a, en 1940, estis antaŭvidata en Tornako: sed fakte organizita en Bruselo. Pro la milito ĝi tamen ne okazis; same kiel ne okazis tiu planita en la ĉefurbo, en 1946 pro la ne jam sufiĉe restariginta movado.

La tri lastaj Kongresoj, la 37a, 38a, okazis en Beneluksa kadro kaj la proksima, — en Gento 1956, — estos jubilea: la 40a!

la naturaj lingvoj. Ĉu vere la Majstro pro tio estu kritikinda kaj korektinda? La facileco de lingva uzado - kaj Esperanto estu antaŭ ĉio: facila - ja ne ĉiam dependas de ĝia logikeco.

S-ro de Hoog paralele analizas la teoriojn de la renovigantojn (precipe de la amsterdama skolo), montras ke la ŝanĝoj proponitaj en la nomo de la logiko, jen ne estas tiel logikaj kiel oni asertas, jen kontraŭas la konstatojn de la lingvistiko.

La ampleksan kaj riĉe dokumentitan pritraktadon, kies legado malgraŭ la ŝajna sekeco de la temo estos plezuro por ĉiu kiu interesiĝas pri lingvo-problemoj, li finas per alvoko al esperantistaro: ke ĝi unuece sekvu la tute pravigeblan ekzemplon de Zamenhof, kio „ebligas al ni transdoni Esperanton al posta generacio en ĝia pura originala formo”.

Informon pri la ĉefaj ekzamenitaj esprimoj kun la kompara vorto KIEL donu la sekvanta resumo.

Dum la kia-istoj uzas, rekomendas aŭ postulas parolturnojn kiel „knabo KIA mi; li estas tia KIA lia patro; ŝi aspektas sama KIA vi; malĝoja KIA la alia”, Zamenhof ĉiam uzas KIEL se la komparo estas esprimita per frazoparto. Do: „mizera estaĵo KIEL mi; mi ne estas tia KIEL la aliaj, la uzado de la artikolo estas tia sama kiel en aliaj lingvoj; pala KIEL neĝo”. La vorton KIA li uzas nur, kiam, ekzistas plena sintaksa korelativo (KIA ago, TIA pago) aŭ kiam ĝi enkondukas adjektivan subpropozicion kun kompara senco (Regis tia frosto, KIAN ni ĉe ni ne havis).

La tiom-kiom-malsano prosperis kiel rimedo por esprimi gradon: „ili ne estas TIOM malbonaj KIOM la homoj”.

Zamenhof, sentante ke grado kaj maniero estas malfacile disigeblaj kaj sekvante en tio la tendencan ĉe naturaj lingvoj, preferu uzis adverbos de maniero (KIEL) por gradesprimo de kvalito („mi estas TIEL forta KIEL vi”) kaj la iom-serion por la gradesprimo de agoj („tiu lingvo TIOM fortikiĝis en la mondo, ke...”).

La saman naturan vojon li iras en la parolturnoj: TIOM PLI bona; IOM varmeta.

Certe, estas kelkaj citaĵoj el la verkaro de Zamenhof kiuj ne lasas sin enpuŝi en tiujn malmultajn regulojn. S-ro de Hoog montras, ke ili tamen ne estas nekonsekvencaj aŭ eraraj, sed necesaj rimedoj por traduki pli subtilajn nuancojn kiujn postulis la delikata lingvosento de la Majstro. Ni ripetu: ne sen plezuro la scivola studento legos la lerte prezentitan komenton.

F.C.

LA EKSPRESIONISMO (Fino)

de M. VAN GEEL

La jaroj 1914 ĝis 1918 signifis por la ekspresionismo kaŝan forto-kolektadon. Revuoj, ekz. „Die Aktion”, tute silentis pri la milito kaj la politiko. Kiam la nova arto volis pritrakti la homajn problemojn, metitajn de la milito, la cenzuro intervenis kaj tiel mutigis ĝin. Ekzistas eĉ ne unu ekspresionista verko, eldonita en tiuj kvar jaroj, en kiu oni povus malkovri ian aprobon de la milito, tiel profunde ĝia esenco plenas per la antitezo inter la XIX-jarcenta nacie indvidua kaj la moderna humane socialista ideologio.

Formale ne ekzistis antitezo. La verkoj ĉie eldonitaj post 1918 kaj pritraktantaj la milit-okazaĵojn (ĉu por priskribi ilin, ĉu por filozofi pri ili) kontraŭe pruvas ke, por la ekspresionismo, la milito estas ekstreme riĉa temo, ĉar la milito plej trafe montras al la homaro la vivon kaj la morton. La ekspresionismo nutras la haŭso de la homaj rilatoj, sed tamen nur por ŝirmi la homaron kiu, en la XIX-jarcento ĉesis, subpremato de la naturo, obei sian Demonon. Ĝi celas la savon de la vivo, de libereco kaj de justo. Ĝi necese estas internacia. Ĝi kunigas la homojn kaj unufoje faras Eŭropon ununuran sentosferon, preskaŭ religie izolita kiel mezepoko.

La milito rompis preskaŭ ĉiujn kontaktojn inter la eŭropaj ekspresionistoj, tiel ke dum nelonga tempo la spirito parte perdis forton kaj valoron.

Tuj kiam tiu baro malaperis, la ekspresionismo ree ekfloris freŝpotence.

Mi ankaŭ momenton haltos ĉe la evoluo de la ekspresionismo en la malaltaj landoj. Pro la milit-cirkonstancoj Flandrujo, pli frue ol Nederlando, kontaktiĝis kun la ekspresionista idealo, devenanta el Germanujo. Post mallonga tempo dinamismo, senrimaj versoj, kosma sento, humanismo, socia arto rilatanta al etikaj kaj politikaj valoroj, fariĝis sloganoj ĉe la antverpena kaj genta junularoj.

Por vortigi la nekonscion, ili malakceptis ĉiujn klasikajn formojn kaj teknikajn regulojn kaj riskis la plej aŭdacajn eksperimentojn.

En 1920 la polemiko kun la antaŭaj generacioj fariĝis vera malpaco. Tiuj antaŭaj generacioj, ekz. „Van Nu en Straks” kaj ties postflorado nur provetis defendi kaj reorganizi sin.

La moderna junularo, bonvenigata ĉe la finigo de la unua mondmilito kun grandaj esperoj kaj iluzioj, montris fervoran laboremon. La revuo „Ruimte”, fondita en Antverpeno en 1920, estis la unua provo defendi la novan arton, bazitan sur etika principo. Tamen la idealoj de internacia

frateco kaj radikala flandremismo neniel konsistigis sufiĉan komunan bazon. Kiam „Ruimte” malaperis la revuo „Vlaamse Arbeid”, reaperinta post la milito sub la gvidado de J. Muls — kaj iom da tempo de Karel Van den Oever — gastame akceptis la junulojn kaj precipe Paul van Ostaijen.

Estis ĉi tiu kiu iniciatis la flandran poezion, nome per sia „Music-Hall”, en kiu li klopodas priskribi tipon de moderna urbo kaj de kafé-chantant por esprimi la kolektivan animon de homgrupo. Poste, en sia verskolekto „Het Sienjaal”, li montriĝis la reprezentanto de la politik-revolucia ekspresionismo. Lia plej granda eksperimento estis „Bezette Stad”; malgraŭ la amasigo de impresoj, la forlaso de ĉiaj sintakso kaj interpunkcio, la uzo, de ĉiaj tipografiaj rimedoj, kiuj penis pri translimaj futuristoj kaj dadaistoj — tute kiu estas preskaŭ unikajo en nia literaturo — li tamen iam kreis simplan lirikon. Ni tiurilate pensu pri ekz. „Melopée” kaj „Avondgeluiden”.

La germanan komponiston Paul Hindemith, konatan aldivilonvirtuozon, vere frenezigis la ekspresionista idealo, kiun li esprimis en ĉiu verko. Ne malofte lia muziko estas cinika kaj groteska.

Oni ne pengu kompreni la ekspresionistan artesprimon: oni povas nur senti ĝin. Ĉia klarigo estas superflua. Kiu ne povas sekvi la artiston, esperu nur kompreni la novan artemon per pli profunda intimiĝo kun ĝiaj kreaĵoj.

Fine, ni dum momento haltu ĉe la postekspresionista periodo, ekestinta en la poezio post 1930. Ĝi denove uzis la klasikan formon kaj tute celis la plej nuancitan montriĝon de la interna vivo.

Pli indiferenta al la ekstera formo de la aĵoj, ĝi volis esprimi per belsonaj, iel malplenaj versoj, la plej profundan animvivon de la moderna homo.

Sed se tiu nova celado estas pli eminenta, ĝi fariĝis malpli spontanea.

Anoncetoj

AL BOLOGNO. Kiuj el Nederlando aŭ Belgujo ŝatas veturi kun mi en mia aŭtomobilo? Kostoj malpli ol vagonare. Loko por tri personoj. Woessink, Vondellaan 47, Arnhem (Ned.).

Leteresperon aranĝos la Lille-a grupo: skribu tuj ĝis 1/11/1955: rue de Ratisbonne, 87 - Lille (Franc.).

BELGA KRONIKO

Prezidanto: S-ro Maur. JAUMOTTE, De Bruynlaan, 44, Wilrijk.

Vicprezidanto-Kasisto: S-ro J. Soyeur, 91, Rue du Chêne, Seraing.

Vicprezidantino: S-ino J. Plyson, 185, rue Jourdan, Bruselo.

Generala Sekretario: S-ro H. Sielens, „Internacia Marista Domo”, Falconrui, 21, Antverpeno.

(Poŝtĉeknumero: R.B.L.E.: 13.37.67)

ANTVERPENO

Esperanto-Grupo „La Verda Stelo”

(Poŝtĉekkonto: 726.54)

La 6an de majo, la parolata ĵurnalo havis la kutiman sukceson.

Dimanĉon, la 8an, okazis belega ekskurso al la nederlanda insulo Walcheren. Trideko da membroj ĝuis plej agrablan kaj interesan tagon. Gvidata de speciala gvidisto la aŭtoĉaro veturis tra la regiono tiel terure subakvigita antaŭ du jaroj. Dank' al la dolĉa vetero, la ekskurso plensukcesis.

La 13an, multaj gemembroj estis allogataj pro la anonco de radiofona teatra elsendaĵo, nome de la verketo „Nubetoj”, kiun skribis antaŭmilita jam, nia malnova samideanino S-ino Lucette Faes-Janssens. La teatraĵo estis tre lerte interpretita de F-inoj Cl. Peeters kaj J. kaj M. Ameryckx, de S-ino Félicie Jaumotte kaj de S-roj G. Bastien, novvarbita kunlaboranto; Fr. Schellekens kaj Jules Verstraeten. Krom la rolo de la anoncanta „voĉo”, S-ro Roger Jaumotte, ankaŭ kiel reĝisoro, sperte gvidis tiun ĉi amuzoplenan teatraĵon. S-ro Montmirail, kiel kutime, bonege flegis la diversajn aparatojn kaj prizorgis la sondekoron. Ĝis agrabla prezentado, kiu kontentigis unuanimé la ĉeestantojn.

La 20an, F-ino Math. Hofkens parolis okaze de la granda ekspozicio en la urba Festsalono, pri la fama artpentristo Vincent Van Gogh, kies vivon dramoplenan ŝi detale skizis kaj kies verkon ŝi pritraktis, montrante samtempe sur la blanka fono la ĉefentraĵojn de tiu granda artisto. Ŝi akiris varmajn aplaŭdojn.

G. FAES

16, Schoenmarkt, 16

ANTVERPENO

Por via MUZIKO,
RADIO kaj GRAMOFONO

La 27an, la gemembroj ĝuis dum amuza vespero allogan programon kaj la 28an, 29an kaj 30an dudeko da gemembroj partoprenis la Beneluksan Kongreson en Utreĥto, pri kiu diversaj partoprenintoj raportis dum la parolata ĵurnalo de la 3a de majo.

La 10an, oni vizitis la antverpenan pentekostan kermeson kaj franca samideano, kiu hazarde estis en la urbo, akompanis la grupon.

La 17an, S-ro Roger Jaumotte paroladis, laŭ tre lerta kaj amuza maniero pri „ĵurnalismo” kaj tiuokaze montris plurajn lumbildojn, kiujn li komentaris kun sperteco. Pro foresto de la libertempanta prezidanto, S-ro Verstraeten, sekretario, prezentis kaj varme dankis.

La 24an, okazis la diplomdisdono al la lernintoj de la somera aŭ printempa kurso de F-ino Henny De Ketelaere kaj tiuokaze la speciala sekcio organizis kabaretvesperon. Pri tiu ĉi solenajo ni raportos en la proksima numero.

Programo de la venontaj kunsidoj:

Ĉiuvendre en „Witte Leeuw”, Frankrijk 4, je la 20.30a h. (1-a etaĝo):

Julio: la 1an: Parolado kun lumbildoj de S-ro Maurice Jaumotte, pri „Bretonlando”; la 15an: Promenado tra la urbo; la 22an: Debatvespero; la 29a: Amuza vespero.

BRUGO

Bruga Grupo Esperantista

(Poŝtĉeknumero: 4835.33)

La 10an de majo, post la unuaj horoj de la kermeso, okazis ĝenerala raportado pri la kermeso foire kaj speciale pri la komuna vizito farita post la kunveno de la 3a.

Fino M. Willems vekis ĝeneralan intereson antaŭlegante la 17an de majo, du ĉarmajn regionajn legendojn: „Kiel punto estis unue farata en Bruĝo” kaj „Jantje van Sluis”.

Dum la kunveno de la 24a de majo estis alprenataj la lastaj aranĝoj por la Beneluksa Kongreso en Utreĥto, al kiu ĉeestis 14 gegrupanoj kaj pri kiu estis entuziasme raportata dum la tuj sekvanta kunveno de la 31a.

Por sia vintra provizo

Por sia antracita karbo

la Esperantistoj mendas

ĉe

BELGOMINE

FRANKRIJKLEI, 20

ANTVERPENO

kiu donas specialan premion

La 7an de junio okazis triopa interparolo kun posta raportado, post ke S-ro L. Van Wassenhove antaŭlegis unuan artikolon de li humorene verkita pri la aventuroj de la Bruĝanoj survoje al la kongreso de Utreĥto.

Pri la sama kongreso, du pliaj artikoloj de la sama aŭtoro, bonege esperantigitaj de F-inoj M. Willems kaj S. Mantelers, estis antaŭlegataj de la tradukintinoj dum la kunveno de la 14a de junio.

Programo de la sekvontaj kunvenoj:

Ordinara kunveno ĉiumarde je la 20a, en la sidejo: „Gouden Hoorn - Cornet d'Or” Simon Stevinplaats 2.

Ĝis komence de aŭgusto, dum la unua horo de ĉiu kunveno: Elementa kaj perfektiga kurso por novaj kaj malnovaj membroj:

Julio: 5an: Libertempaj projektoj; 12an: Legado de B.E.; 19an: Parolata gazeto; 26an: Muzika vespero.

Augusto: 2an: Triopa interparolado; 9an: Novajoj pri la Universala Kongreso en Bolonjo; 16an: Parolata gazeto; 23an: Muzika vespero; 30an: Libertempaj memoraĵoj.

BRUSELO

Esperantista Brusela Grupo

(Poŝtĉekkonto 12.30.48)

La 2an de majo okazis la Parolata Gazeto kun la kutima plensukceso. S-ino

BRUGGE

BRUGES

Hôtel du Cornet d'Or

2, Simon Stevinplaats, 2

Centra situo - Moderaj prezoj

Moderna komforto

Sidejo de „Bruga Grupo Esperantista.”

Tel. 314.59

Niaj legantoj bone notu ke la numero de julio-aŭgusto aperos ĉirkaŭ la 20/7/1955; en ĝi ili povos legi la lastajn sciigojn pri Bologua.

LES ENTREPRISES

DERKS

226, Rogierstrato, BRUSELO

Tel. : 15.19.92

Entrepreno de

KONSTRUAĴOJ

Elly Staes rikoltis la plejmulton da poentoj:

La 9an de majo ni aŭdis Sinjorinon Stern, helpatan de sinjoroj Swinne kaj Castel. Grava debato okazis pri la — ĉu jes aŭne — kulpeco de la edzino de Macbeth.

La 16an de majo, la prezidanto S-ro Jacobs anoncis la sukcesplenajn rezultojn de la ekzamenoj pri simpla kapableco. S-ino Lecat ankaŭ parolis pri la „Morala Rearmigo” el Caux-Svisujo.

La 23an de majo, nia bona samideano Swinne pritraktis filozofiajn perspektivojn. La kunveno finiĝis per longaj diskutoj pri tiu interesa temo.

Programo de la sekvontaj kunsidoj:

Julio: London, la 4an: Parolata Gazeto; la 11an: Parolado de F-ino Isaacson: Silko-artoj; la 18an: F-ino M. Kestens promonadigos la membraron tra parto de la malnova Bruselo; la 25an: Amuza Vespere, gvidota de S-ino Elly Staes.

LIEĜO

„Lieĝa Grupo Esperantisto”

Jam en la komenco de la jaro ne-oficiala restariĝis la „Lieĝa Grupo Esperantista”.

Ĝi nun petis aliĝon aŭ pli ekzakte realiĝon al R.B.L.E. kaj pri tiu demando decidis la administrantaro dum sia kunveno de la 2a de julio proksima.

Intertempe ni povas jam anonci, ke la socia sidejo estas ĉe S-ro Soyeur, kiu funkcias kiel sekretario (Adreso: rue du Chêne, 91 en Seraing); ke estas nia malnova samideano S-ro J. Desonay, kiu prezidas, kaj nia bona kunorganizinto de la Lieĝa Kongreso S-ro M. Guyot, kiu flegas la kason.

La grupaj kunvenoj okazas ĉiumarde, de la 17a ĝis la 18,30a h. en la Kafejo „Aux Blés d'Or”, Place Maréchal Foch 11, en Lieĝo.

En proksima numero, ni donos pliajn detalojn pri la vivo de tiu ĉi grupo.

Nekrologo

Dum la lunda kongresa tago, D-ro Th. Van Gindertaelen, estis telefone revokita hejmen. La sanstato de lia patro S-ro Auguste Van Gindertaelen, kiu estis de longe malsana, subite pligraviĝis.

La tagon poste, la patro de nia administranto mortis.

Nia Liga prezidanto kun plura membroj de nia loka grupo ĉeestis la enterigan ceremonion en Antverpeno.

Ni prezentas al nia administranto kaj al lia familio, la esprimon de nia sincera kondolenco.

Por viaj esperantaĵoj, libroj, insignoj k. c.

Belga Esperanto-Instituto

26, Oostenstraat, 26
ANTVERPENO

kui ankaŭ havigos al vi nacilingvajn librojn, revuojn kaj gazetojn, kaj ĉiuspecan skribmaterialon.

LISTO LE LA MEMBROJ-KOMERCISTOJ

Antverpeno

„In 't Duiveken” (S-ano Paesmans), Lge Koepoortstr. 64: Kostumoj

(5% rabato al Esp.)

Vino Max Bolsius, Diepestraat 58-60, Antverpeno: Kuirejilaro. Tel. 32.57.85

M. Phillips, Karel Rogierstr. 1, Antverpeno. Korsetoj - Rab. 5-10% por la membroj.

P. van der Hoydonck-van den Buys, Kapelsesteenweg 549, St. Mariaburg.

ŝuoj — Teksaĵoj — Merceraĵoj. Tel. 74.27.86

J. Montmirail, Kortemarkstraat 53, Berchem. Arhitekto. Tel. 39.58.66

Morris de Ketelaere, Oostenstraat 25, Antverpeno. Hemiaĵoj. Tel. 39.17.09

Henny de Ketelaere, Oostenstraat 25, Antverpeno. Privataj lecionoj

Roger Jaumotte, Cyriel Buyssestr. 44, Antv. Anoncoj en tagjurnaloj. Tel. 37.47.14

K. Amerijckx, Melgesdreef 40, Merksem. Centra Hejtado. Tel. 45.81.07

R. Vanistendael, Dambruggestraat 234, Antverpeno. Okulvitroj — Rab. 5 0/0

CL. Peeters, Onderwijsstraat 68, Antverpeno. Apotekejo. Tel. 35.40.67

L. Van Reybrouck, Venusstraat 33, Antverpeno: Ĉiŝp. iloj por la hejmo. Tel. 32.43.88

Firmo van Iseghem & Verstraeten, St. Bernardse steenweg 631, Hoboken.

Vitraĵoj — Speguloj — Tel. 37.88.20

J. van Nereaux, Sterstraat 1, Antverpeno. Viandisto. Tel. 39.55.81

J. van Nereaux, Sterstraat 1, Antverpeno. Aŭtoĉar-eksploato. Tel. 39.20.59

H. Peeters, Vordensteistr. 58, Schoten. Ingen.: Neon-lumo, Reklamoj. T. 81.48.47

H. Jacques, Lange Beeldekenstraat 31, Antverpeno. Presaĵoj. Tel. 33.75.38

Verdijck, Oude Doncklaan 106, Deurne. Ĉiaj asekuroj kaj hipotekoj. Tel. 39.06.07

P. Peelman, Volkstraat 34, Antverpeno. Fumaĵoj — Pantofloj. Tel. 37.62.55

Y. Ameryckx, Helmstraat 154, Borgerhout. Peltaĵoj

M. Blajwas, Simonsstraat 40, Antverpeno. Frizisto. Tel. 32.13.18

KOMERCISTOJ kiuj senkoste propagandas por Esperanto per reklamoj en siaj butikoj

G. Baeten, Belpairestraat 53, Berchem. Tel. 39.22.81. Frizisto por sinjorinoj

„De Boerinekens” (Clem. Van Hassel). Estro de la trinkejo en la Flandra Operdomo

A. Roels, Montignystraat 155, Antverpeno. Ledaj artikoloj-Selisto. Tel. 37.14.07

G. Goemaere, P. Genardstraat 39, Antverpeno. Speciejo, laktejo

Vandersmissen, Kampioenstr. 11, Antverpeno. Papaĵoj, parfumaĵoj

Van Kerekhoven, Grote steenweg 63, Berchem. Fornoj: forĝaĵoj

R. Scheerdijk, Oude Vaartplaats 34, Antverpeno. Ŝnuroj; lignaj ŝuoj; lanternoj ĝardenilaro

Butiko Angora, (galerio), Huidevettersstr. Antverpeno. Luksaj pantofloj, sportŝuoj

Bruselo

Farmacisto Jacobs, 94, rue général Eenens Bruxelles 3

15.26.01

Farmacisto N. Nelis, Meise

59.13.73

„BONBONS SWINNE”, 77, rue de Nieuwenhove

44.57.36

Imprimerie Liélens, 18, rue de la Princesse

21.10.98

CARRELAGE „Carrart”, 19, avenue de Saxe

21.74.49

Viajn MEBLOJN ĉe S-ro Weyn, aĉetu rue Destouvelles, 57

15.96.97

Libroj, Publikaĵoj, ĵurnaloj, F-ino Kestens 24, rue Bodenbroeck

11.71.03

Tinkturejo, senmakuligejo „DEX” 16, rue Esnest Laude

15.28.29

Verreries et Miroiterie DESMECHT & C°

LA LOUVIERE

S.P.R.L.

Tel. n-roj 223.01 - 225.37

Du esperantaj markoj:

TABULO, por lernejtabuloj; KATOKULO, por signalvitroj.